Radio Ĉerizo 1

2011-01-16

Radio Ĉerizo disigas elsendon el la suda Japanio. Nun novaĵo.

En la 12-a(dek dua) de januaro, 2011(dumil dek unu), en senĉesa pluvetado ekvojaĝis la trejna ŝipo "Sacuma Seiun-maru" de Marafera Meza Altlernejo de Kagoŝimo, de la haveno de Makurazaki, centrante la fiŝejon trans pacifika oceano ĝis ĉirkaŭ havaja insularo.

Sinsekvis kuraĝigaj salutoj de estroj de multaj organizoj.

- *"syoorai waga kuni no suisan, kaiyoogyoo o ninau yuuina kaigisi to naru tame no sisitu ya giryoo o syuutokusuru kookai de nakereba narimasen."*-

Vi aŭskultas la satuton de la studento, reprezentante 22 ekzercaj studentoj...

- *"watasitati kaiyoo ka kikan koosu 2(ni)-nensei zissyuusei wa konniti yori 71(nanazyuu iti) niti kan no en'yoo kookai zissyuu ni itte mairimasu..."*-

Kaj ilin kuraĝigis ĥoroj de restantaj studentoj dum debordiĝo.

- ĥoro -

Patrinoj svingis brakojn kaj manojn de dekstre al maldekstre, por ĝisrevidi siajn filojn, iuj en larmoj.

- *"ganbare yoo!" "ganbatte yoo!"* -

Studentoj havos grandan aventuron en la 500(kvincent)-tuna, ne tiel granda ŝipo, dum 71(sepdek unu) tagoj, farante pli ol 30(tridek)-fojan ekzercon de fiŝkaptado, kaj havos amikan interŝanĝon kun la liceo post surbordiĝo al Vajkikio, Havajo.

Oni povos vidi fortigitan junulon ĉe la haveno ĉi tie, post la vojaĝo.

Radio Ĉerizo raportis pri la junuloj de la gubernio Kagoŝimo, la suda Japanio.

Finiĝas ĉi-foja programo. Ni atendas vian impreson kaj kuraĝigon per e-letero. Ankaŭ voĉa letero estas bonveniga. Retadreso estas "Radiocxerizo ĉe go, mo, a, i, lo, punkto, co, o, mo." (radiocxerizo@gmail.com) radiocxerizo estu unuvorte, kaj ĉe en ĉerizo estu co, ikso, e.

Radio Ĉerizo dankas pro via atentema aŭskultado. Nun ĝis reaŭdo.